

FRATA PARO - Saĥaleno kaj Hokkajdo!

Ĉu vi tuŝus la amikan lingvon Esperanton?

Esperanto estas facila kaj justa lingvo.

La 15-a de aŭgusto 2016 (lun.)

Ekde 18:30 ĝis 20:30

Kotizo: Senpago

Kunvenejo: Гостиница Гагарин Ĉe kunvenejo en la 9-a etaĝo

Южно-Сахалинск, ул. Комсомольская 133

<Prelego kaj Kurso pri Esperanto fare de japanoj>

oPrelego: “La Amika lingvo Esperanto”

- Eksĉefkomitatano de Hokkajda Esperanto-Ligo - HOŜIDA Aĉusi

oKurso: “ABC de Esperanto”

- La Esperanta Rondo de la Hokkajda Universitato - NIŜIBATA Kacutoŝi

Ĉeforganizanto:

La karavano propagandi Esperanton kaj interamkiĝi kun saĥalenanoj fare de tuthokkajda esperantistaro

Ni restas ĝis la 17-a de aŭgusto en la hotelo Гостиница Гагарин. Bv. vizitu nin libere.

(Interpretisto de la rusa lingvo: s-ro Kawabata)

Kontaktoj pri io ajn al Japanio [retadreso]: hosidaacusi@kir.biglobe.ne.jp (Hoŝida)

Se vi ne estas Esperantisto, bv. skribu ion ajn en la facila rus-lingvo.

Kaj pardonu malfruan respondon pro nia senspereco.

Kial oni bezonas Esperanton?

Post kiam Esperanto estis publitigita en 1887, kvankam diversaj malfacilaĵoj ĝenis nian vojon, Esperanto daŭras kaj progresas senĉese. Nun oni diras, ke milionoj da homoj lernas kaj uzas Esperanton en la mondo. Kial tia lingvo estis proponita kaj ekzistas daŭre? Tion rezultis socia situacio post moderna tempo.

1. La amasa vivo fariĝis internacia

Post moderna tempo demokratigo progresas kaj naciaj kulturoj kaj lingvoj evoluas, kaj oni funde kaj vaste interrilatiĝas kun aliaj naciaj kulturoj. Tial internacia vivo kaj kulturo ne nur koncernas fakulojn kaj riĉulojn, grande fortiĝas koncerni la amasojn.

2. Sed eksterlandaj lingvoj estas malfacilaj

Rimedo por aliĝi al internacia vivo estas lerni eksterlandajn lingvojn. Sed ĉiu ajn eksterlanda lingvo estas malfacila. Oni diras, ke gepatra lingvo estas majstrita longatempe de sia infaneco, kaj oni komprenas ĝin kiel trinki patrinan lakton. Multa mono kaj tempo estas necesa por uzi libere la malfacilan lingvon. Amaso ordinare ne estas riĉa kaj libere. Tial homoj, kiu lernas japanan lingvon en Saĥaleno, aŭ la rusan lingvon en Hokkajdo, estas limigita.

3. Aldone eksterlandaj lingvoj estas multaj

La angla lingvo estas adoptita en nacia deviga edukado kaj uzata en internacia komercado fone de forto de Usona kapitalismo. Sed en Japanio, kvankam plejparto de la amaso sufiĉe lernas, ili ne sufiĉe komprenas la anglan. Plie, la rusa lingvo estas grava eŭropa lingvo same kiel la germana kaj la franca, kaj oni ne povas neglekti ankaŭ la ĉinan kaj la japanan. Ankaŭ la hispana kaj arba lingvoj kaj aliaj estas gravaj por kompreni mondan situacion. Tiel la malfacila kota vojo kontraŭ ellernado de eksterlandaj lingvoj daŭras senfine.

4. Graveco de etna memstareco

Vi, rusoj, bezonas gardi kaj evoluigi unue la rusan lingvon por rusoj kaj ĉiun etnan lingvon. Iukaze okazas, ke uzi alies lingvon sklavigas la uzanton sub la lingvo. Ekz-e, se en internacia konferenco oni ne uzas sian lingvon kaj paloras alies lingvon ne-mastritan, perdiĝas egaleco inter lingvoj de la partoprenantoj. Internacia demokratia lingva ordo estas ja postulata surbaze de nacia memstareco.

Esperanto estas nenies nacia lingvo. Ĝi estas dua lingvo por ĉiuj. Uzi Esperanton neniam difektas naciecon de la uzanto. Tiu facila lingvo garantias egalan kaj demokratian lingvan ordon internacian.